

LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
LIMMEN (N. H.)
NEDERLANDO

Gironumero
209354 Nederl.

JARABONO:
NEDERLANDO:]
0.80 GULDENO

Jarkotizo T. J. O. inkl.
„La Juna Vivo” 1 gld.

F. H. H. H. H.

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

KAMO NO KOMEJ.

Antaŭ nelonge ni legis japanan poemon, almenaŭ, la tradukon de ĝi. Estis tre rava poemo, gracia, kaj kun delikata ĉarmo. Kamo no Komej nomiĝis la viro, kiu antaŭ multe, multe da jarcentoj verkis ĝin en la malproksima Japanujo. „La Ermitejo”, tiel nomiĝas lia poemo, kaj la ermito estas li mem.

Kamo no Komej seniluziiĝis en la vivo. Li forlasis la homan socion, kaj li kaŝis sin en la nebulaj altaĵoj de la monto Ohara. Tie li konstruis ermitejon „nur dek futojn longa kaj larĝa, kaj apenaŭ 7 futojn alta”. Pli li ne bezonas por dumtage sidi pensante, kaj nokte streĉi siajn lacajn membrojn. En soleco li rigardas la pasadon de la sezonoj. Kiam aŭtuniĝas, li de ĉiuflanke aŭdas la akran ĉirpadon de la griloj, kaj li demandas sin, ĉu ili eble priploras la vanecon de lia forpasanta vivo. Tiam li hejtas la bruletantan fajron kaj ludas per sia liuto malgajan kanton, kanton, kiun neniu aŭdas, kaj do povas soni, kiel ĝi sonas....

Kelkfoje Kamo no Komej aŭdas novaĵon el la urbo, kiun li forlasis. Malgajaj novaĵoj tio ofte estas: mortis antaŭaj konatoj, furiozis bruloj. Momenton trafas lin tiaj novaĵoj, sed ili ne daŭre povas ĝeni lin. Kaj tiel li kantas sian ermitan kanton: „Kiu konas sin mem kaj la mondon, tiu sopiras nur unu aferon: la kvieton de la soleco, kaj nur tiam li estos vere feliĉa, kiam li sentas zorgojn pri nenio, kaj estas maltrankvila pri nenio.”

Kamo no Komej konstruis sian loĝejon nur por si mem, kaj ne por aliaj. Aliaj konstruu siajn domojn tiel, ke ili povas akcepti amikojn; li tiom seniluziiĝis pri siaj antaŭaj amikoj, ke li

anstataŭ ilin nur ĝuas la brilon de la luno kaj la sonon de kordoj kaj fluto. Tiel li nun loĝas en sia alta soleco; li deziras nek vivi, nek morti: „Same kiel flosanta nuboj mi kroĉiĝas al nenio aŭ nenio....”

Estas tre malfacile, ĉu, senigi sin de la subtila ĉarmo de ĉi tiu malnova poezio! — Ĉu ankaŭ vi ne dezirus agi kiel Kamo no Komej, kiu senzorge nutras sin per la fruktoj, kreskantaj apud lia ermitejo, kaj forigas sian soifon per la fontakvo, kiun li kolektas en la malgranda lago. Ĉu eble ankaŭ vi ne dezirus pasigi vian vivon en tiel kvietaj, kaj de nenio ĝenata soleco? Al la novaĵo, kiun hazarda promenantulo rakontus al vi, vi nur duone aŭskultus. Kaj kiom ajn trafa ĝi estus, ĝi ne tuŝus vin, ĉar vi ja ne plu apartenus al tiu mondo, malproksima en la movoplena valo....

Ĉiam denove en la mondhistorio, en tempoj de grandaj ŝanĝiĝoj kaj skuantaj okazoj, homoj revis la revon de Kamo no Komej. Kiam laŭ ilia plaĉo la bruado de la tempo tondris tro forte, kiam tro alten leviĝis la ondoj de ne-atenditaj akvoamasoj, kiam subite ekestis baroj sur la vojoj, laŭ kiuj ili kutimis iri, tiam ili embarasiĝis. Sed anstataŭ liberigi sin, kaj forte ekstari en la bruoj, kaj batali kontraŭ la akvo, kaj serĉi aliajn vojojn, ili fuĝis en revon.

Ho certe, en la soleco de tiu fuĝo ili verkis ofte tre belajn poemojn, kaj ne sen kortuŝo vi ankoraŭ nun aŭskultas al la melankolia ĉieldeziro de la pietisto el la 17-a jarcento, aŭ al la romantikisto el la 19-a jarcento. Sed kiam vi finlegis ilian kanton, kaj kiam ĝia sono malaperis, vi subite klare eksentas: Tamen ĉi tio estas malinda por la vere kuraĝe vivanta homo, ĉio ĉi tio estas pli la esprimo de senkuraĝeco ol de inda vivkoncepto. Kaj kiam pri tio vi bone konscias, tiam vi deturnas vin de Kamo no Komej, kaj vi lasas tiun soleculon en lia ermitejo. Ĉar vi komprenas, ke lia soleco estas nur la forta deziro pri trankvilo, kaj la ŝajna paco de malesperulo. Vi lasas lin en la aŭtuna vespero malgaje kanti ĉe sia liuto, kaj vi mem reiras al la valoj, el kiuj li fuĝis. Mortis tie homoj, kaj bruloj furiozegis, sed senmorta tie estas la tero, kiu denove bezonas plugadon, kaj kie ne plu povas atendi la necesa laboro.

Ho Kamo no Komej, rava kaj gracia estis via poemo, kaj ne sen sorĉo, sed tamen — ni ne sekvos vin, ni ne konstruos ermitejon apud via, ni ne fermos okulojn kaj orelojn, kiel vi faris. Ho Kamo no Komej, ni reiras al la valoj. Via kanto forsonas, via ermitejo malaperas malantaŭ vojkurbiĝo. Nebuloj estiĝas ĉirkaŭ via monto. Estu de ni salutata, ni iras tien, kie atendas nin la laboro! (El „La Popolo”)

LA JUNA VIVO EN „LA JUNA VIVO”.

Al Frislando.

Estis bela vetero, kiam ni sabatmatene, la 13-an de julio, dekope komencis la bicikladon al Frislando, kie okazos semajnfino. Ses knabinoj kaj kvar knaboj el diversaj vilaĝoj de Nord-Holando partoprenis. Iom antaŭ la sesa matene la unuaj ekvojaĝis, nur iom post la oka la lasta aliĝis. Tre favora al ni estis la vento, kiu estis sudokcidenta, sed la vetero iom ŝanĝiĝis, kaj fine eĉ pluvetis. Ne gravis, ni jam kunportis pluvmantelojn, do kantante ni daŭrigis al la fermdigo. Meze sur la fermdigo okazis malgranda akcidento: kelkaj inoj falis unu pro la alia. Feliĉe neniu mortis, do ree al la celo. Kiam ni venis sur la frisa bordo estis iom antaŭ la unua. Ni pretiĝis teon kaj buterpanojn. Apetito certe ne mankis. Subita pluvego tro rapide finiĝis la manĝadon. Bonegan hejmon ni trovis sub viadukto, kiu estis en la tuja proksimeco. Post la pluvo ni komencis la lastan parton al Leeuwarden, kie ni alvenis iom post la kvara. F.ino v. Wetering bonvenigis nin. Tie ni ricevis ĉambron je nia dispono, kie ni denove pretiĝis buterpanojn. Vespere ni kune iris al „De Prinsentuin”, kie estis kunveno kun la frisaj esperantistoj. Ĉi tie ni renkontis gekonatojn el Tervuren kaj Groet. Ankaŭ S-ino v. Veenendaal ĉeestis kaj proponis, ke la frisoj venu al Bakkum la 24an kaj 25an de aŭgusto por tie viziti la semajnfino. Post la kunveno ni iris al diversaj partoj de la urbo por dormi ĉe gesamideanoj. — Dimanĉmatene ni iris por la tuta tago al Tietjerk, ĉar la distanco al Beetsterzwaag estis por ni, holandanoj, tro granda, pro la fakto ke ni lundon denove devos bicikli pli ol cent kilometrojn. En Tietjerk ni unue vizitis la belan parkon kaj la panoraman turon, poste ni remis per malgrandaj boatoj sur la laĝetoj. Sur la bordo ni manĝis. Rev-

eninte en la parko ni ankoraŭ iom ludis. Je la sepa ni ree estis en niaj novaj hejmoj, kie varma manĝo jam atendis nin. Post la manĝado ni faris viziton al la familio Strasser, kiu regalis nin per teo kaj frisaj „duumkes“. Tiam ni ankoraŭ vizitis la plej vidindajn aferojn, kompreneble unue la „Oldenhove“. Jam mallumiĝis kiam ni disiĝis.

Lundon je la oka matene ni kunvenis ĉe f-ino v. Wetering. Tiam ni devis adiaŭi la frisajn ĝeamikojn: „Ĝis revido en Bakkum“ estis la adiaŭa vorto. S-ino Strasser faris paroladeton kaj donacis grandan kukon, S-ino v. Wetering donacis skatolon da kuketoj. „Dankon al vi, frisaj ĝesamideanoj, multan dankon pro la agrablaj tagoj!“

Kiam ni foriris, kelkaj frisaj ĝesamideanoj akompanis nin ĝis Franeker, kie ni faris fotojn de la ĝaja grupo. Post la adiaŭo ni rapidis al Holando. Meze sur la fermdigo ni manĝis, aŭ pli bone manĝegis, kaj surgrimpis la monumenton ĉe „De Vlieter“. Tiam la vento estis nord-orienta, do denove kiel eble plej favora. Proksimume je la sesa posttagmeze ekpluvegis. Tiam ni estis en Heerhugowaard. Ni trovis hejmon en malnova ĉarejo, kie ni formanĝis la lastan panon kaj lastfoje pretigis teon. La pluvo, se eble, ankoraŭ pli ĝajigis nian vojaĝon.

Sed ĉio havas sian finon. Je la sepa ni post tri plezuraj tagoj, disiĝis. Ĉiu iris sian vojon. Adiaŭo! Ĝis revido!

Unu el la dek.

Ni ankoraŭ ricevis du belajn raportojn pri la semajnfinoj en Leeuwarden kaj Bakkum de Neeltje Kool kaj Sju Buwaldo.

Ili eble aperos en la venonta numero de „La Juna Vivo“.

.... „Mi ankaŭ kredas kun vi, ke la ideo de tutmonda frateco venkos, ke la homoj de diversaj nacioj kaj gentoj donos iam al si la manojn por frata kaj solidara kunlaborado kaj kunhelpado. Kompreneble tiu tempo estas ankoraŭ malproksima, sed tio ne signifas, ke la ideo de la Esperantistoj estus utopio neefektivigebla, kaj vana sonĝo....“

(Ĉeĥ.)

S. O. en T.-O., Pr. Böhmen u. Mähren.

Samtempe kun ĉi tiu milito ni bezonas grandegan spiritan batalon. Ni deziras, ke ĉiu ebla persono en la mondo partoprenu tiun batalon.

Ni bezonas aerumi niajn proprajn mensojn; ni bezonas malkaŝajn interŝanĝojn; ni devas atingi ian komunan komprenon.

Ni bezonas ellabori klaran koncepton pri la mondordo, kiun ni preferus ol ĉi tiun ĥaoson.

Ĉi tiu granda mond-batalo devas disvolviĝi, kaj ĝi devas okazi nun. Nun, dum la pafiloj ankoraŭ tondras, estas la tempo por pensado.

(De angla amiko.)

El „La Nova Mondordo“.

Instigo! Geamikoj, la kotizo por TJO kaj „La Juna Vivo“ estas tiel malalta, ke vi pro tio ne bezonas ekŝiĝi! Kunvoku la anojn de via grupo kaj instigu ilin resti anoj! Ĝuste en la nuna tempo estas tiel necese! Restu fidela al nia organo, ankaŭ en ĝia provizora malgranda formato. Ĉiu numero donas ankoraŭ sufiĉe por pripensi kaj pristudi.

Tuj post la apero de ĉi tiu numero ni dissendos la kvitancojn, kaj pli ol iam ni esperas, ke ĉiu faros sian devon, tiel ke ni ne rericevos kvitancojn.

TRE SIMPLAJ EKZERCOJ POR TIUJ, KIUJ NUR MALLONGE STUDIS ESPERANTON.

(IV.)

„Bonan tagon, sinjoro instruisto.“

„Bonan tagon, karaj lernantoj!“

La lernantoj salutas la instruiston kaj ili deziras al li bonan tagon. Ili sidas en la benkoj kaj rigardas al la instruisto. Bonaj lernantoj atentigas kaj aŭskultas, kion la instruisto diras al ili. La instruisto prenas la skatolon de la tablo kaj metas ĝin sur la benkon. Sub la tablo kuŝas la spongo. La instruisto prenas ĝin de sub la tablo kaj purigas per ĝi la malpuran tabulon. La spongo estas mola, kaj la tabulo estas malmola. Mi bone komprenas, kion la instruisto diras al ni. Post la leciono estas paŭzo. Ni iras el la ĉambro, kaj ankaŭ la instruisto forlasas la ĉambron. Post la fino de la lecionoj ni iras hejmen kaj ni estas tre feliĉaj. Hejme mi longe studas pri la matematiko. Ĝi ne estas tiel facila kaj simpla kiel Esperanto, kiu estas la plej facila lingvo!

Kiun salutas la lernantoj? Kion ili deziras al la instruisto? Kion vi faras? Al kiu vi rigardas? Al kio vi rigardas en la lernejo? Ĉu vi aŭdas, kion la instruisto diras? Ĉu vi komprenas la Esperanto-frazojn? Kiaj lernantoj ne atentigas? De kie la instruisto prenas la skatolon? Kien li metas ĝin? Kio kuŝas sub la tablo? De kie la instruisto prenas la spongon? Kion

li faras per la spongo? Kian tabulon li purigas? Kia estas la spongo? Ĉu la tabulo estas ankaŭ mola? Kio estas post la leciono? Kiu ankaŭ forlasas la ĉambron? Kien vi iras post la lecionoj? Ĉu vi estas feliĉa? — Ĉu Karlo estas malsana? Ĉu ŝi estis hieraŭ en la lernejo? Kion ŝi faras hodiaŭ? Kie estas la ĝardeno? Kiaj floroj estas rozoj? Kiuj floroj estas en lia ĝardeno? Kiu tre ŝatas florojn? Kia estas la odoro de la ĝardenaj floroj? Kia estis la hodiaŭa mateno? Ĉu vi scias, kia estos la morgaŭa tago?

Antaŭhieraŭ mi mem skribis la lernejan ekzercon, kaj ĝi estis bona, eĉ pli bona ol via. En la skriba ekzerco vi faris la saman eraron, kiel mi, kvankam mi ne sidis proksime al vi, sed malproksime de vi. La plej bona amiko de mia patro revenis de sia longa vojaĝo kaj rakontis al ni dum kelkaj vesperoj diversajn historiojn pri sia vivo. Hejme ni estas kun tri gefratoj. Mi ricevis de li tre dikan libron kun multaj bildoj. Mia frato ne ricevis libron, sed grandan pilkon. Li ludas per ĝi sur la korto de nia domo kun siaj ĝeamikoj. Al mia fratino li ankaŭ donis libron. Sed ŝi pli ŝatas sporton kaj diversajn pilkludojn, ol librojn. Mia tuta familio estis hieraŭ ekster la domo kaj mi restis sola en la ĉambro. Mi lernis sufiĉe longe, ĉar la lecionoj estis malfacilaj. Poste mi legis la novan libron kaj post la legado mi iris eksteren, por renkonti la gepatrojn, kiuj revenis el la urbo.

Kiu el vi ĉiuj faris la plej bonan ekzercon? Ĉu vi havis multajn erarojn en via ekzerco? Ĉu A. sidas proksime al B? Kiuj sidas plej proksime al la instruisto? Ĉu vi havas amikojn? Kiu estas via plej bona amiko? Kiu revenis de longa vojaĝo? Kion li rakontis? Ĉu li rakontis nur dum unu vespero? Kion ricevis la knabo de la sinjoro? Ĉu lia frato ricevis ankaŭ libron? Kun kiuj ludis la knabo? Kie ludis la knaboj? Kion donis la onklo al la fratino de la knabo? Kion pli ŝatis la knabino: sporton aŭ librojn? Ĉu ankaŭ vi ŝatas pilkludi? Kial la knabo restis sola en la ĉambro? Kion li faris hejme? Kial li lernis longe? Kie estis liaj gepatroj? Kie li renkontis siajn gepatrojn?

En la parko (unuakta komedieto)

Personoj: Helenjo, ĉ. 10—11 jara knabino, kaj Karolo, pr. samaĝa knabo, amiketo de Helenjo.

Scenejo: Angulo en la parko, kun benko. Malantaŭ la benko estas densa arbeto. H. sidas sur la benko kaj legas libron. Alvenas Karolo.

K.: Bonan matenon, Helenjo! Kiel vi fartas?

H.: Bonan matenon, Karolo! Dankon, bone. (Paŭzeto). Sed kio okazis, ke vi ne forvojaĝis por libertempi?

- K.: Bedaŭrinde ni havas malfacilaĵon pri la pasporto, kaj tial ni vojaĝos nur post kelkaj tagoj.
- H.: Bedaŭrinda afero....
- K.: Ĉu vi permesas, ke mi eksidu apud vi?
- H.: (Iom surprizita pro la ĝentileco de Karolo): Ko-ompre-neble, sididiĝu nur!
- K.: Dankon. — Kiun libron vi legas?
- H.: „Mil kaj unu noktoj”. Mi ĵus finlegis ĝin.
- K.: Ĉu ĝi plaĉas al vi?”
- H.: Jes, ĝi estas tre bela. Hodiaŭvespere mi jam redonos ĝin al vi, kiam mi iros promeni kun panjo.
- K.: Vi ne bezonas tiom rapidi. Se vi venos, mi donos al vi kelkajn aliajn, por ke vi havu sufiĉe da legaĵo dum mia foresto.
- H.: Mi antaŭdankas vin! (Foliumas en la libro).
- K. (mallaŭte): Helenjo....?
- H. (turnas la kapon por aŭskulti)
- K.: M-mi volas diri al vi ion.... Ĉu vi povas doni al mi unu....?
- H. (ruĝiĝas iomete): Kkkion? (ŝi ne komprenas)
- K.: Vi ja bone scias kion. Neniu nun vidos....
- H. (estas en embaraso)
- K. (daŭrigas).... aŭ eble tie malantaŭ la arbetoĵo....?
- H.: Karolo! Kion vi parolas?! Memoru, ke mi plendos al mia panjo! (Ŝi prenas sian mansaketon kaj intencas foriri)
- K.: Sed Helenjo, vi mem diris, ke — hodiaŭ....
- H.: Kion?! Ĉu vi kuraĝas eĉ mensogi?! Fi! (ekstaras kaj jam ekpaŝas)
- K.: (Kaptas ŝian manon kaj flustras iomete laŭte). Vi ja diris, ke via panjo estas tabakvendistino, kaj ke vi hodiaŭ donos al mi..... cigaredon.....

Kurteno

El „Heroldo”.

POR KOMENCANTOJ.

Inĵiana respondo.

- „Kiaj estas la haroj de via patrino?” — „Blondaj.”
- „Kiaj kiaj estas la haroj de via patro?” — „Nigraj.”
- „Kaj la haroj de via avo?” — „Li havas nur kapon.”

Ĉu tro multe?

En granda fabriko regis ega konfuzo. Unu el la plej gravaj maŝinoj subite rifuzis, kaj neniu povis ripari la difekton.

Post multa penado oni decidis venigi la inĝenieron, kiu muntis la maŝinon.

La inĝeniero venis. Dum kelka tempo li turnis ĉiajn ŝraŭbojn kaj stangojn. Poste li prenis martelon, kaj batis malforte sur iun parton de la maŝino. La miraklo okazis: La aparato ree ekfunkciis, kaj ĉio estis bona.

Poste la inĝeniero transdonis fakturon de 100 guldenoj. La direktoro opiniis tiun sumon tro alta. Li diris, ke la inĝeniero ja nur unufoje batis per martelo. Tio ne estis granda peno!

La inĝeniero reprenis la fakturon, kaj skribis novan, kiu aspektis jene:

Por unu bato per martelo	gld.	0.10
Por trovi la ĝustan lokon	gld.	99.90
		<hr/>
		gld. 100.—

Sen plua plendado oni pagis la fakturon.

Mark Tvain.

Mark Tvain, la konata humoristo, iam vizitis pentriston. La artisto gvidis Tvain al sia laborejo, por montri siajn pentraĵojn. Unu bildo, kiu ankoraŭ ne estis preta, tre interesis la humoriston. Ĉar li volis scii, ĉu oni pentris ĝin sur lignon aŭ tolon, li per fingro tuŝis ĝin.

„Atentu amiko!” kriis la pentristo time. „Kion do vi faras! La farbo estas ankoraŭ malseka!”

„Ne gravas”, respondis Tvain tute kviete. „Mia ganto jam estas malnova.”

Respondu al jenaj demandoj:

Kio estis Mark Tvain? Ĉu Tvain estis fama? Kiun li vizitis? Ĉu la pentristo akceptis Tvain en sia familia ĉambro? Kio estis en la laborejo de la pentristo? Ĉu ĉiuj bildoj estis pretaj? Ĉu la bildoj interesis Tvain? Kial li tuŝis unu el la bildoj? Kial kriis la pentristo? Kion li timis? Ĉu Tvain surhavis novajn gantojn? Ĉu Tvain komprenis la pentriston?

Anekdoto pri Sjaljapine († 1938).

Kiam la fama rusa kantisto Sjaljapine lastfoje vizitis sian patrujon, li veturis per glitveturilo tra Moskvo. Estis belega vintra vetero, kaj la artisto sentis sin tiel kontenta, ke li ekkantis.

Post kelka tempo la veturigisto turnis sin, kaj demandis: „Diru, kamarado, kio estas via profesio?”

„Mi kantas”, estis la respondo.

„Jes, sed mi informiĝis pri via profesio!”

„Mi kantas!” ripetis Sjaljapine.

La veturigisto skuis la kapon kaj diris indigne: „Mi jam supozis, la viraĉo estas ebria!”

Respondu al jenaj demandoj:

Kio estis Sjaljapine? Kia li estis? En kiu lando li naskiĝis? Ĉu li poste vizitis tiun landon? Ĉu Sjaljapine ankoraŭ vivas? Kiam li mortis? Ĉu li iam estis en Moskvo? Ĉu li promenis en la urbo? Ĉu li mem gvidis la glitveturilon? Kia estis la vetero? Kial Sjaljapine ekkantis? Ĉu la veturigisto konis Sjaljapine? Kion li demandis? Ĉu Sjaljapine respondis klare? Kion pensis la veturigisto?

Feliĉo !

„Hieraŭ mi ĉasis tigrojn!”

„Kaj ĉu vi havis feliĉon?”

„Bonegan! Mi vidis eĉ ne unu tigron!”

Trafa respondo.

Du viroj renkontis unu la alian sur tre mallarĝa vojeto.

„Mi ne iras flanken por ĉiu azeno!” diris la unua.

„Tion mi faras!” diris la dua, kaj li iris flanken, tiel ke la unua povis pasi.

Antaŭzorgo.

„Kiel mi povas antaŭzorgi, ke mi ĉe la martelado ne batas sur mian manon?”

„Tre simple. Tenu la martelon per viaj ambaŭ manoj.”

Fabelo.

Instruisto: Karleto, ĉu vi scias kio estas fabelo?

Karleto: Jes sinjoro.

Instruisto: Nu, bonvolu klarigi por ni.

Karleto: Estas fabelo, se kamelo kaj azeno parolas, kiel vi kaj mi.

Maldiligentulo.

„S-ro Farbo estas maldiligentega viraĉo!”

„Kiel?”

„Li pentras nur vintrajn pejzaĝojn, tiam li ne bezonas fari foliojn sur la arbojn!”

Tasko: Laŭtleĝu ĉiujn rakontojn en la rubriko por komencantoj. Notu ĉiujn vortojn, kiujn vi ne konas, kaj poste lernu ilin. Lernu parkere: „Infana respondo”, „Feliĉo”, „Trafa respondo”, „Antaŭzorgo”, „Fabelo” „Maldiligentulo”.

La venĝo de la vilaĝanoj.

Iam aŭtomobilo tre rapide veturis tra vilaĝo. La infanoj, kiuj ludis sur la strato, estis en granda danĝero. Gardisto kun aro da anseroj ne sufiĉe baldaŭ povis flankeniri, kaj multaj bestoj mortis sub la radoj de la aŭtomobilo. Anstataŭ halti, kaj pagi la domaĝon, la ŝoforo rapide daŭrigis.

Tamen — iom preter la vilaĝo, lia veturilo subite haltis, kaj li ne sukcesis ree funkciigi la difektan maŝinon. La nura solvo estis, reiri al la vilaĝo, kaj peti la helpon de la vilaĝanoj. Unue oni en la vilaĝo postulis altan sumon, por pagi la mortigitajn anserojn. Tiam li petis, ke la vilaĝanoj helpu lin tiri la aŭtomobilon al la stacidomo. Ili nur volis fari tion, kondiĉe ke li mem eksidu en la veturilo. Kvankam li tre malŝatis, li ja devis fari tion, por direkti ĝin. La malicaj vilaĝanoj tiam jungis azenon kaj bovinon antaŭ la aŭtomobilo, kaj tiel la amaso iris triumfe tra la tuta vilaĝo.

RAKONTU LA ENHAVON PER VIAJ PROPRAJ VORTOJ.

Por ĉiuj legantoj.

La homo ne plendu pri sia tempo. Se la tempo estas malbona, jen ja estas la homoj por plibonigi ĝin! Th. Carlyle.

Libereco signifas respondecon. Tial la plej multaj homoj timas la liberecon. B. Shaw.

La homo laŭnature inklinas al ĉiu malbono (oni diras), sed pli forta estas en li la deziro al la bono. A. H. Gerhard.

FUNEBRO.

La 7-an de aŭgusto mortis post mallonga malsano en Neer (Nederlando) la fervora Esperantisto **Frans Hautus**, en la aĝo de 23 jaroj.

Li havis multajn geamikojn en kaj ekster Nederlando, kiuj certe ne forgesos lin, kaj espereble daŭrigos la laboron por nia movado, por kiu li donis siajn plej bonajn fortojn.

komunikoj

Tutmonda Junular-Organizo.

Komunikojn por ĉi tiu rubriko oni sendu rekte al la sekretario. S-ro Meydam, Lingestr. 11, Leerdam (Ned.).

Protokolo

de la laborkunsido de TJO, okazinta la 24-an de aŭgusto 1940 en Bakkum, Ned.

Je la 5a kaj duono la Prezidanto, s-ro Krijt, malfermas la kunvenon kaj bonvenigas la ĉeestantojn. Li memorigas la antaŭajn membrokunvenojn en Groet kaj Tervuren, kaj rimarkas, ke la nuna kunveno okazas sub strangaj cirkonstancoj. Li bedaŭras, ke en ĉi tiu kunveno povas partopreni nur la nederlandaj membroj de TJO. Li eksplikas, ke pro trafikaj malfacilaĵoj la kunveno ne povis komenciĝi je la fiksita horo.

La Prezidanto proponas, ke antaŭ ol komenci la pritraktadon de la diversaj punktoj, la kunveno komune kantu la himnon „La Espero”. Tio okazas kaj laŭ peto de ĉeestantoj ĝin sekvas la TJO-kanto „Marŝo de la Junularo”.

La Sekretario, s-ro Meydam, nun legas la protokolon pri la antaŭa membrokunveno en Tervuren (Belgio). La protokolo estas aprobata kaj la pritraktado de la sekretaria jarraporto, kiun ĉiuj atingebaj anoj ricevis en la gazeto „La Peranto”, sekvas.

Kaŭze de la raporto, s-ro v. d. Schaaff (Leeuwarden) petas la parolon, ĉar pro ĝi li rememoras kelkajn organizajn plendojn pri la Junular-kunveno en Tervuren. Detale li priskribas la malordon, kiu — laŭ li — regis dum la adiaŭa mateno en Tervuren. S-ino van Veenendaal-Bouwes replikas lin. S-ro Krijt diras ke oni bone konsideru la cirkonstancojn, se oni havas plendojn. La estraro esploris la neperfektaĵojn de la kunveno en Tervuren kaj promesas, ke ĝi en la estonto bone atentos tiajn aferojn. La jarraporto plue aklame estas aprobata.

Ankaŭ la financa raporto, kiu formas la sekvantan punkton de la tagordo, sammaniere aprobiĝas.

La raporto de la Filmservo nun pritraktiĝas. Ankaŭ ĝi montriĝas bona. S-ino van Veenendaal-Bouwes havas nur unu plendon: La filmoj ne sufiĉe estas prezentitaj. Tio estas bedaŭrinda, ĉar la filmoj estas vere unikaj propagandiloj en la Esperanto-Movado.

La Prezidanto certigas, ke TJO alte taksas la laboron de s-ro Schut, la gvidanto de la Filmservo.

La kvara punkto de la tagordo temas pri la kunvenoj. La Prezidanto

petas la Sekretarion klarigi tiun punkton. Ĉi tiu respondas, ke li havas nenion novan pri tiu temo, ĉar detalaj raportoj pri la okazintaj kunvenoj jam aperis en la TJO-Organon. S-ro Kars, (Leerdam) Estrarano, klarigas, ke ĉi punkto pli koncernas la estontajn kunvenojn ol la estintajn. Li proponas, ke oni jam nun faru projekton por la Junular-kunveno en 1941a. La Prezidanto opinias, ke estas malfacile, jam nun decidi au plani. S-ro Kars petas, ke do la kunveno mandatu la estraron por fari eventualajn decidojn pri tio. S-ro v. d. Schaaff opinias tion pli bona ol atendi; ni devas rigardi la estonton. La kunveno konsentas.

Sekvas la punkto: Estraro. Escepte de f-ino J. van Dijk (Rauwerd) la Estraranoj ĉeestas. S-ro Krijt proponas lasi la Estraron tia, kia ĝi estas. S-ro Kars atentigas, ke oni eĉ ne rajtas ŝanĝi ĝin, ĉar la nuna kunveno fakte ne estas oficiala ĉar la alilandaj anoj mankas. Do, ĉiuj Estraranoj restos sur siaj postenoj.

Sesa punkto: TJO-Perantoj. La Prezidanto demandas al la Sekretario kiel statas la funkciado de la Perantoj. Ĉi tiu diras, ke en la estinto la Perantosistemo sufiĉe malbone fartis, almenaŭ kio rilatas la lokajn Perantojn. Sed ĝuste en la lastaj monatoj la afero iras en bona direkto; daŭre anoncas sin novaj lokaj Perantoj. Li do fidus, ke en la proksima estonto la reprezentado de TJO en la diversaj lokoj bone estos organizita.

Propagando. S-ro Meydam kaj Kars ensendis proponojn koncernantajn la propagandon de TJO. S-ro Kars eksplikas la proponon, kies enhavo estas jena:

Ĝis nun ni eldonis diversajn propagandaĵojn, kiuj eldonoj liveris sufiĉe kontentigan profiton.

Tamen ni fikse opinias, ke ni en tiu direkto povos pli intense propagandi, se ni organizu la eldonadon kiel memstaran fakon.

Ĝis nun la ĝenerala TJO-kaso pagis la kostojn de la eldonaĵoj; ĝi ankaŭ enkasigis la monon de la venditaj objektoj. Tamen oni devis mendi la diversaĵojn en Leerdam, pagi en Rotterdam kaj do eĉ por plej malgrava mendo oni devis interrilati al du adresoj.

Ni kredas, ke pro tio multaj personoj ne mendis niajn propagandaĵojn, krome por ni mem la afero ne ĉiam estis superrigardebla. Tial ni opinias, ke necesas, en la intereso de TJO, ke ni starigu apartan fakon, kiu tute memstare laboros, same kiel la Filmservo, kiu estas bonega ekzemplo de memstara laborado. Unu persono do respondecas pri la fako, kiu unu aŭ dufoje jare raportas al la Estraro.

Ni do starigu: T.J.O.-PROPAGANDSERVON.

Tiu ĉi Servo administradu ĉion rilate al la TJO-propagandiloj. Oni mendu kaj pagu la TJO-aĵojn al tiu Servo. Per tiu mono, ĝi eldonu novajn propagandilojn kaj ĝenerale agadu, por ke la TJO-propagando estu plej efika en la tuta mondo.

Per tio ni atingas, ke la kasisto kaj sekretario ne bezonas okupiĝi pri multaj malgrandaj aferoj kaj do fariĝas liberaj por tute dediĉi sin al la internacia laboro. Tio eble en la nuna momento sonas iom strange,

sed ni ja devas agi en la fido, ke baldaŭ ĉiuj internaciaj rilatoj estos normalaj.

La gvidanto de la Propagandservo havu kontakton kun la landaj ĉefperantoj. Li liveru al ili la TJO-propagandaĵojn kaj ili distribuu ilin al la mendontoj.

Pri la celo de eventuala profito la membro-kunveno decidu en la fino de la administra jaro. Ĝi, se necese, fluu en la ĝeneralan kason, alie ni apliku ĝin por eldoni aliajn propagandaĵojn.

Ni tiel organizu la vendadon de la diversaĵoj, ke perantoj kaj revendantoj havu etan rabaton por kovri siajn necesajn elspezojn.

Al la Propagandservo apartenu la GAZETARSERVO.

„La Peranto” estu ankaŭ eldono de la Propagandservo, sed ĉar tiu eldono, same kiel la Gazetar-servo, ne liveras monan profiton, ĝiajn elspezojn, same kiel tiujn de la Gazetar-servo, pagu la ĝenerala TJO-kaso, almenaŭ en la unua jaro.

La gvidanto de la Propagandservo samtempe prizorgu la propagandon en Holando, sed oni komprenu, ke tiu afero staras tute aparte de la internacia propagandservo.

Ĉiu lando havu sian propran propagandservon. Ĝin administradu la ĉefperant(in)o.

Tiu enlanda propagandservo ricevas enspezojn pere de la kotizoj de la membroj-simpatiantaj. 80% de tiu sumo estas por la enlanda propagando.

En ĉiu lando oni propagandu laŭ propra programo. Ni — en Nederlando laŭ nia opinio — plej efike propagandas per „De Esperantist”, sed ni ja ne scias, ĉu tia propagandaĵo estos efika en alia lando.

La holanda propagandservo do enspezos 80% de la kotizoj de la membroj simpatiantaj, krome la pagon de la kolportantoj de „De Esperantist”.

Por starigi la Internacian Propagandservon ni faru bilancon de la TJO-propagandaĵoj. TJO donas la tutan stokon al la Propagandservo kaj tio do formas la komenckapitalon de la Propagandservo.

Se TJO por organizaj laboroj bezonos kovertojn, paperojn, ktp., ĝi simple aĉetu tion de la Propagandservo por la kostprezo.

S-ro v. d. Horst (kasisto) opinias la fondadon de tia aparta propagandfako superflua, almenaŭ nuntempe. Ĝis nun ĉiuj proponitaj propagandeldonoj okazis, kaj la en- kaj elspezoj de tiuj eldonaĵoj estis por ĝenerala kaso. La dua propono (pri la nederlanda propagando) fakte jam funkciis. S-ro Kars priskribas la diversajn malfacilaĵojn, kiujn oni spertis en la estinto pro la kaŭzo, ke la propagando ne aparte estis organizita. Li deziras aranĝi la aferon tiel, ke ni havos bonan sistemon tuj kiam TJO ree internacie povos agadi. S-ro v. d. Horst opinias, ke ni agu laŭ la nunaj cirkonstancoj kaj ne laŭ revoj pri la estonto. S-ro Krijt unuflanke laŭdas la proponon, sed aliflanke bone komprenas la kontraŭmotivojn. Li proponas kompromison. S-ino van Veenendaal-Bouwes pledas por la proponoj; ankaŭ s-ro v. d. Schaaff subtenas ilin. S-ro v. d. Horst diras, ke la membrokotizoj nepre ne sufiĉas por la organizaj elspezoj, kaj ne do la profito de la eldonaĵoj estos bezonata de la ĝenerala kaso. S-ro

Kars diras, ke se necese eventuala profito fluos en la ĝeneralan kason; alie ĝi estos aplikata por novaj eldonoj.

La Prezidanto proponas, ke oni akceptu la proponon por la tempo de tri monatoj kaj ke oni poste laŭ la rezulto decidu, kiel daŭrigi. S-ro v. d. Horst subtenas tiun proponon. S-ro Kars opinias, ke tri monatoj ne sufiĉas, precipe en la nuna tempo. S-ro v. d. Schaaf pledas por la proponantoj; tamen li timas, ke ne estas kapitalo por starigi Propagand-servon. S-ro Krijt diras, ke laŭ la propono la Propagand-servo ricevos la tutan stokon de eldonaĵoj; tio formas la komenckapitalon. La prizorgantoj de la Propagand-servo havos la rajton vendi la eldonaĵojn kaj aĉeti novajn per la enspezoj, se la mono ne estas bezonata en la ĝenerala kaso. S-ro Kars diras, ke tio ekzemple povus okazi, je la fino de la administra jaro, aŭ ĉirkaŭ duonjaron.

S-ro Edwards (Amsterdam) opinias ke la proponoj laŭ teĥnika vidpunkto estas bonaj.

Fine la kunveno per voĉdonado akceptas la proponojn. Estas 31 voĉoj por, du kontraŭ.

Oni komisiis s-rojn Kars kaj Meydam prizorgi la propagand-servon. Ĝia adreso estos Meent, Leerdam. Ĝiro 386072.

La Prezidanto ne povas resti pli longe por ĝustatempe atingi sian hejmon. S-ino van Veenendaal-Bouwes anstataŭas lin.

Daŭrigante la pritraktadon de la propagando oni nun preparolas la propagandorganon „La Peranto”. La Kasisto diras, ke tiu gazeto dum la pasinta jaro kostis tridek tri guldenojn. En la estonto ni malfacile povos fari tian elspezon, tial estas dezirinde, ke la TJO-anoj abonu la gazeton je dudek kvin cendoj jare. Diversaj personoj anonceas sin kiel abonantoj.

S-ro Kars atentigas ankoraŭ pri la celo de „La Peranto”. Ni kelkfoje senpage sendis ĝin al ĉiuj membroj, ĉar ĝi enhavis raportojn. Tamen en la estonto ni povos havigi ĝin nur al perantoj; kies tasko estas konigi la enhavon al la anoj en ilia loko. Tiel ni reduktos la kvanton kaj sekve la kostojn. Se oni tamen deziras ricevi ĝin, oni ĝin abonu.

Sub la punkto Propagando la nederlandlingva gazeto „De Esperantist” estas preparolata. Ĝia redaktoro, s-ro Kars, klarigas, ke la kotizoj de la nederlandaj simpatiantaj membroj ebligis la eldonadon. Tamen la gazeto povas ekzisti per la pagoj de la legantoj, se ĉiu ano faras sian devon kaj laŭpove kolportas la gazeton. Tiel oni samtempe efike propagandas nian idealon. Precipe la infangrupoj bone povas vendi la gazeton. Kvanto de 3000 ekzempleroj ja estas bagatelo por kvarcent anoj! Li do instigas la membrojn: Savu ankaŭ „De Esperantist”!

S-ro v. d. Horst, konstatante, ke en la nuna necerta tempo neatenditaj aferoj povos okazi, proponas, ke la membraro donu al la Estraro la liberecon por fari gravajn decidojn se necese. S-ro Edwards opinias, ke la Estraro bezonas liberecon, sed poste ĝi devas pritrakti la eventuale faritajn decidojn. La kunveno konsentas.

S-ino van Veenendaal-Bouwes raportas, ke la eldonado de „La Juna

Vivo" dum la pasinta jaro liveris deficiton, tamen iu samideano kovris tiun deficiton. Ŝi plendas pri la pagado de la abonantoj. Sub la nunaj cirkonstancoj ŝi povos aperigi la gazeton sesfoje jare. Krom pagojn el Nederlando, ŝi nur ricevis kotizojn el Portugalio. Ŝi tamen sendis la gazeton al la anoj en la aliaj landoj, kiuj ne povis transsendi monon.

Cetere ŝi petas konsilon pri la enhavo de „La Juna Vivo”. Ŝi ĉiam pretas akcepti bonajn artikolojn. Ni ĉiam devas zorgi, ke la gazeto estu interesa por junuloj kaj plenaĝuloj kaj ke ĝi ĉiam estu neŭtrala.

En la ronddemando s-ro J. Geus (Koedijk) demandas, kiu devas pagi la elspezojn de la lokaj perantoj. La Kasisto respondas, ke al la TJO-kaso neblas pagi tiujn elspezojn. La kotizo ja estas nur unu guldeno jare de kiu sumo TJO pagas okdek cendojn po membro por la abono al „La Juna Vivo”. Se ni devus pagi la plenan prezon de „La Juna Vivo” ni certe pagus pli ol unu guldenon. Li konsilas, ke la Perantoj en siaj lokoj formu grupojn; la anoj de tiuj grupoj pagu etan sumon por kovri la elspezojn de la Peranto.

F-ino van Veenendaal (Limmen) demandas ĉu ne eblas plialtigi la jarkotizon, sed montriĝas, ke tio provizore ne estas konsilinda.

La Prezidantino konkludas ke TJO bezonas monon. Ŝi instigas ĉiun membron labori sur propra tereno laŭ kapablo kaj fermas la kunvenon.

La Sekretario.

Propagandservo. De nun ĉiuj TJO-eldonoj estas haveblaj en unu centra oficejo: Propagandservo de TJO, Meent 35, Leerdam, ĝironumero 386072.

Ni esperas, ke ĉi tiu aparta organizado de la Propagando bone influos la vendadon de la TJO-eldonaĵoj. Jen listo de la eldonaĵoj:

Bicikloflagetoj		Hgd. 0.30
Glumarkoj (malaltigita prezo)	po 100	
Kovertoj	po 100	
Leterpapero	po 100	
Insignoj		
Poŝtkartoj	1 cendo po 1	po 100
Korespondpaketoj		

La prezos inkluzivas la afrankon. Perantoj, kiuj revendas la TJO-aĵojn ĝuos rabaton.

Semajnfinoj. La TJO-semajnfino en Bakkum, Nordholando, kiu okazis je la 24-a kaj 25-a de aŭgusto en la konstruaĵo „De Eenheid” bone sukcesis. Pro la malpli favora vetero la nombro de partoprenantoj ne estis tiom granda kiom ni atendis; ĉeestis proksimume sesdek personoj, ĝenerale pli aĝaj membroj. Sabatvespere okazis la ĉiujara membro-kunsido (vidu protokolon); poŝt la laborkunsido la kunvenintoj faris belan noktan promenadon al la nordmara strando. La dimanĉon oni pasigis per promenadoj kaj ludado, kaj precipe per kantado. Mary Snijders el Leerdam pianludis kaj tra la konstruaĵo gaje sonis la kantoj, tiom konataj el la Junular-kunveno en Tervuren.

Venis la adiaŭo kaj ĉie oni aŭdis la promeson: „Ĝis post du semajnoj”. Tiam ja denove okazus TJO-kunveno en la sama loko.

Por ĉi tiu kunveno anoncis sin jam pli ol 100 partoprenantoj; ĉio estis aranĝita kaj jen kelkajn tagojn antaŭ la dato venis sciigo, ke oni subite bezonas la konstruaĵon por alia celo. Ni tamen iris al la norda regiono kaj gastloĝis ĉe geamikoj.

SEMAJNFINO EN WEST-GRAFTDYK, 26—27 OKTOBRO. Nia klubo „La Kampfloroj” organizas semajnfino en West-Graftdyk. Por tiu celo ĝi luis la salonon de s-ro Kramer, kaj samtempe la kuirejon, por mem pretigi trinkaĵojn, ktp. La dormado okazos ĉe Esperantistoj kaj sur pajlo-sakoj en subtegmentoj.

Programo: Sabatvesperon kun-esto en la salono. La grupoj kaj personoj ekster W. Graftdyk montros siajn povojn. (Ankoraŭ restas sufiĉa tempo por enstudi ion!)

Dimanĉmatenon: La filmoj pri Groet kaj Tervuren estos montrataj.

Dimanĉposttagmezon: La grupo el West-Graftdyk prizorgos belan programon, propagandeele. Do tiam ankaŭ la vilaĝanoj, ne-esperantistoj, povos veni.

Komenciĝo: Sabate je la 4-a horo ni atendas vin.

Finiĝo: Dimanĉe, proksimume je la 4-a. — Tiuj, kiuj venis de tre malproksime kompreneble povos resti pli longe ol unu nokton.

Oni kunportu: Panon por sabato kaj dimanĉo, lankovrilon, littukojn aŭ dormsakon, muzikilojn, kantarojn, tualetartiklojn, kaj — bonan humoron.

Kostoj: Por la tuta semajnfino: 50 c. Por la dimanĉo: 30 c. Per la nura posttagmezo: 20 c. Trinkajojn kaj frandaĵojn oni ricevos senpage.

Venu grandamase por multe ĝui per malmulta mono en nia bela Esperantujo. Por certigi al vi dormlokon, anoncu vin kiom eble plej baldaŭ ĉe la sekretariino Guur van Ammers, West-Graftdyk. J. v. V.

ENIGMOJ

1. x x x x x x
2. x x x
3. x x x x
4. x x x
5. x x
6. x
7. x x
8. x x x
9. x x x x
10. x x x x x
11. x x x x x x

La vortoj signifas: 1. Parton de Britio. 2. Loĝanton de tiu regiono. 3. Laŭtan vokon. 4. Korelativon. 5. Nombro. 6. Konsonanton. 7. Same kiel 5. 8. Parton en la brusto, kiu igas cirkuladi la sangon (rad.). 9. Monton el stono. 10. Kapveston de reĝo aŭ imperiestro. 11. Travidebla membrano de la koro.

Ĉiujn vorton oni konstruas el la antaŭa vorto, t.e., oni uzas la samajn literojn, minus aŭ plus unu. (Ekzemple: patro-rato-ora). La sinsekvo de la literoj sanĝiĝas.

Koedyk, Nederl.

J. P. GEUS.

Inter la ĝustaj solvintaj ni lotumos 2 premiojn. Ni atendas solvojn ĝis 1 Septembro.

La solvo el No 10—11

1. Satano
2. anaso
3. taso
4. aso
5. no
6. o

KORESPONDADO

Responde al multaj: Ripetfoje mi ricevas leterojn pri ŝanĝoj en „La Juna Vivo”. Sed la proponoj ofte estas tute malaj. Ni ne povas kontentigi ĉiujn legantojn. Tial mi kore petas ĉiujn amikojn, ke ili en la nuna malfacila tempo fidu je ni. Mi ĉiam kun danko akceptas ĉian konsilon, se ĝi estas konsilo, sed ne postulo.

S-ro F. en Lisboa (Port): Viaj rakontoj estas tro longaj. La stilo ne estas sufiĉe simpla kaj logika. Ili do ne taŭgas por „LJV”.

S-ro L. en B. (Franc): Laŭdas „LJV”, kaj precipe ŝatas, ke ni klopodas eduki la junularon al pensa memstareco. Li konsilas enkonduki en la rubrikon por komencantoj sub la ekzercoj multajn nerektajn demandojn. — Red: Ni faros nian eblon.

Kelkaj malaprobis, ke ni metis ludon sur la unua paĝo de la lasta numero, sub la verkaĵo de D-ro Zamenhof. . . . Ankaŭ al ni ne plaĉis, sed la presisto faris tiun eraron. — Red.

Tre grava sciigo: Amiko de „La Juna Vivo” donacis al nia gazeto 210 gld. kiujn ni devas uzi por kovri la deficiton de la antaŭa jaro.